# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Bob Felby**

PLENUMITA 11/08/2022 Kvincentnaŭdekkvina eldono (unua eldono 20/09/2011)



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;


**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**
Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ http://thesaker.is/

***Uzindaj ligoj*** *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro* *lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *esperanta retradio* *Plena Analiza Gramatiko*

*Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj" korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 696,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **298,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **159,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **143,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas **96,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )



## la esperanta retradio



Donas bonan ĉirkau-5 minutan aŭskultadon kaj legadon ĉiun tagon.

8a aŭgusto 2022
POŜRATOJ PRAKTIKAS SPECON DE AGRIKULTURO

Karaj Amikoj NOTU! Numero 600 de AE post kelkaj semajnoj kaj eble 601 precize 11 jarojn post unua de 2011, eble unu semajnon pli poste! Kion povus eksteraŭstraliaj gelegantoj, kiel mi, kontribui? s-ro Ueli HAENNI

# Surhavu vizaĝmaskon.

*Roger Springer*



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**


**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.** Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Vi respondecas pri via sano, do portu maskojn.

Kiam oni informas min pri fuŝaj vortoj, frazoj, ktp. kiun mi ricevas dum la unua semajno post la ĝenerala elsendo, ili estas korektitaj antaŭ ol mi sendas kopion al AEA por la arkivoj

http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo *Roger Springer*




# El Brizbano ZOOM kunveno La 7a de Aŭgusto 2022




Dimanĉe BES membroj kunvenis per Zoom.
Oscar el Geelong organizas niajn Z-kunvenojn.

*Peter Danzer*

# Traktado de rubaĵo




Altiris mian atenton plasta kesto antaŭ la pordo de ĉiu domo en la vilaĝo Bisley, situanta apud Cheltenham kaj Bristol. En tiu kesto la loĝantoj enmetas ĉiujn organikajn rubaĵojn kaj ĉiusemajne ŝarĝaŭto venas por malplenigi ĝin. En Stroud, apuda  urbeto, estas kolektita la rubaĵo cele produkti komposton.

Ekde 2005 la posedantoj de la lokaj komunaj ĝardenoj en Bisley havas sian propran ekipaĵon por produkti komposton el la rubaĵo de la ĝardenoj. Ĝi estas uzata por fertiligi la ĝardenojn kaj laŭdire helpas ankaŭ la lokan faŭnon .

Tre gravas al la  loĝantoj de tiu vilaĝo la maniero en kiu la tero estas traktita .




el Bisley , *Franciska Toubale*

# Universala kongreso kaj nova libro




Dufoje la Universala Kongreso okazis nur virtuale, sed pasintan sabaton la UK komenciĝis en Montrealo, Kanado. Bedaŭrinde ŝajne estas nur 1 partoprenanto el Aŭstralio: Jonathan Cooper. Pli ol 800 personoj aliĝis al tiu kongreso.Ĉiu kongresano ricevis novan libron kun la titolo "Amo, tuso kaj forpaso". En ĝi estas 29 noveloj de la finalistoj de la pasintjara INK-konkurso. Mi feliĉas, ke mia novelo titolita "Beno aŭ malbeno" estas en tiu libro.



*Beno aŭ malbeno* 27

Beno aŭ malbeno

*de Nicole Else*
Aŭstralio

Helen kaj Sofi estas junaj virinoj, kiuj loĝas en Sidnejo. Ili ambaŭ estas 30-jaraĝaj kaj ne havas vivpartneron kaj do vivas solaj en malgrandaj apartamentoj. Ili ambaŭ laboras en restoracio, sed ne en la sama. Ili ne konas unu la alian. Iliaj vivoj estas bone organizitaj, kaj ambaŭ estas ne perfekte feliĉaj, tamen ankaŭ ne vere malfeliĉaj. Helen deziras renkonti belegan viron, sed ĝis nun ŝiaj amrilatoj ne estis longdaŭraj. Ankaŭ Sofi ŝatus trovi vivpartneron, sed ŝi ne tiom senpaciencas kiel Helen. Sofi sopiras pri honesta, fidinda viro. Beleco ne tiom gravas al ŝi.

Amike,
*Nicole Else*



